

Bezono de la nova granda PIVo estas jam sentata, kvankam nur de la pintaj esperantistoj. Por ĝenerala uzo PIVo /Plena Ilustrata Vortaro/ estas sufiĉe abunda kaj vere estas nun raraj terminoj, kiu ne estas troveblaj.

Ni traktis Eon al tri ĉefaj vidpunktoj: lingvo konversacia, lingvo scienca kaj fine lingvo literatura. Ni lernis sufiĉe argumenti kontraŭ ĉirilataj riproĉoj. Multaj tamen ne estas konvinkaj, riproĉante, ke spite centjaran uzon, Eo ankoraŭ ne ĝeneralis. Ili mokas, ke tio estas pro organiza nekapableco de esp-istoj. Tamen ni havas mondan organizaĵon, kiu intensive zorgas pri disvastigo de la Ilo (Internacia Lingvo). Fakton de facileco de nia lingvo plej bone komprenas evoluanta tria mondo, kiu ne volas sin kliniĝi antaŭ imperialismaj mondlingvoj. Ĉi tie estas vere nutra tero por nia klopodo. Neniam rifuzu helpon al komencantaj afrikaj kaj aziaj esperantistoj. Ni ne estas riĉuloj, tamen ni scias, kion signifas amika ligo kun tiuj homoj. Peno (námaha) lanĉita tiudirekte baldaŭ portos sian frukton. Kvankam poŝtelspezoj minacas sufoki nian movadon, ni elspezu nian monon racie. Amika konatiĝo kun la tria mondo alportos ĉiu ĝojon. Krom tio ĝi gvidos nin al modesto, vidante la simplecon de tie – la vivo kaj senmezuran penon pri eduko kaj penetro al alian mondon. Ni zorgu, ke trialandoj ne alportu al la merkado de internacia amikeco nur valorojn materialajn kaj ilian unuflankan sopiron pri facila vivo de civilizita mondparto, sed ankaŭ iliajn kulturajn valoraĵojn, kiuj ofte povas plibeligi vivon nian. Tamen ne pensu, ke la vivo en la tria mondo estas tiom primitiva, kiel ni opinias. Televido alportis al ni scion pri aktuala stato pri edukiteco kaj vivo en ĉiuj mondpartoj. Ni vidas, ke la indiĝenoj same uzas aŭtomobilojn, same klopodas pri vivostandarto simila al nia vivo. Ni elektu kaj interŝanĝu moralajn kvalitojn per ekkon de ilia kulturo, filozofio, religio, nemateriaj valoraĵoj, el kiuj eĉ ni povas elekti multajn principojn.

Aliaj riproĉas, ke Eo ne havas sian propran poezion. Tiuj gesamideanoj, kiuj okupiĝas pri Eo pli longan tempon ja scias, ke ni jam povas fieriĝi per propra poezio kun pli longa ol centjara tradicio. Eo kiel literatura lingvo kapablas esprimi ne nur ĉiujn nociojn, sed ankaŭ diversajn statojn de emocio, onomatopoeon k.s. Neologismoj: trajno, folkloro, descendi (vagonaro, popoltradicio, malsupreniri) jam tiom enhejmiĝis, ke nur malmultaj malkovris ilin. Tamen la kvanto da uzitaj neologismoj dependas de ĝenerala edukiteco de la aŭtoro – multaj taksas kelkajn neologismojn plene kompreneblajn, forgesante ke ne ĉies esprimkapablo estas la sama. Pro tio ni preferu uzi terminojn la plej simplajn por ebligi simplan interkompreniĝon kaj ni enkoduku neologismojn ne por sinonimoj, sed por esprimi detalan nuancon (odstín) de la prstencový. Ju pli aĝa Eo estas, des pli esprimkapagla, literatura. Legado de poezio alportas la saman ĝuon, kiel la poezio en nacilingvo. La esperanta poezio travivis en mallongigita formo la saman evoluproceson de simplaj poeziaĵoj trans romantikaj, klasikaj ĝis formoj modernaj. Eo kiel poezia lingvo estas kapabla traduki ĉiun mondan poezion de ĉiuj specoj, kie oni ŝatas internan ŝarĝon (náboj) de la vorto kaj ĝian belsonecon. Eĉ kapablo de tradukoj kaj diferencigo de dialektoj (Halvelik, Belgio) ekzistas. Esperanto devas havi esprimojn por blasfemoj (nadávky) kaj eĉ tiuj estis kreitaj. Eo devas esti kapabla transporti el la originalo la stilon de la aŭtoro kaj atmosferon de la verko. Multajn eĉ spertajn seniluzigas nekompreneco de aŭskultata poezio el elstare arte prezentita, precipe lirikaĵo (Seemanová). Ne hontu pro tio. Se la organizantoj de la prezentaĵo antaŭmetus la tekston, kiun vi antaŭ povus pripensi kaj trastudi, nur tiam vi povos plene ĝui la artan valoron de poezia prezentaĵo. Ĉu tiu manko estas karakteriza por e-poezio?

Tutcerte ne – antaŭ por aŭskulto de nacilingva lirikaĵo vi devas sin prepari, kun ĝuo gusti kaj poste digesti. Ĉi tie prezentiĝas denove la problemo de neologismoj. Post kreo de la fundamenta simpla lingvaĵo e-a, ili estis ĉiam proponataj (mi ne povas senigi min de la impresoj, ke ofte el sopiro pri aŭtoro gloro) kiam la aŭtoro sentis mankon dum serĉado de la konvena vorto aŭ se li opiniis, ke neologisma termino estos ĝenerale pli favore akceptata pro sia klareco. Multaj eĉ supertaksis la sciojn de la leganto, supozante ke ĉiu interesulo pri E-o devas esti poligloto. En la **historio** de IL-o (internacia lingvo) ĉiam estis kaj estos batalo inter favorantoj de fundamenta lingvo kaj poetoj, kiuj pliriĉigis nian lingvon per neologismoj belaj kaj simplaj, sentante bezonon por bele esprimi sian lingvon. (Daŭrigota.)

Estimataj legantoj, mi proponas fondi E-asocion de nefumantoj. Ties tasko estu batali kontraŭ fumado kaj protekti rajtojn de la nefumantoj. Ja estas fakto, ke la fumantoj per sia aĉa „hobio“ malutilas al ceteraj homoj, ĝemas kaj malsanigas ilin. Mi persone eĉ asertas, ke la fumado agresas. Ĉar mi mem ne estas organize kapabla, mi ne proponas, ke mi estu kunordiganto de la aktiveco. Eble troviĝos iu organizemulo kun la sama, do kontraŭfumisma starpunkto, kiu pretus la Asocion prepari, fondi, organizi. Mi kompreneble membrus, propagandus kaj pagus eventualajn (se tolereblajn) kotizojn. Cetere, la kunvenojn oni povus efektivigi dum UK-oj kaj aliaj ĝeneralaj E-aranĝoj. Kun saluto: Georgo Rada, Rybalkova 1029, blok 645, CZ 43401 Most.

Ĉu vi konas la gazeton „Ŝance pro duĉodce SENIOR“? Postulu ĝin en via gazetvendejo. En ĉiu numero vi trovos informon pri Esperanto en formo de movada neperforta aktualaĵo el la plumo de s-ano Vl. Sládeček el Ostrava.

Ĉu vi kapablas argumenti...? Kontribuaĵo al la diskuto de Jindra Drahotová (Mladá Boleslav). - „Mi multe cerbumis, sed mi ne konis respondon. La tasko pli malfacila ol ĝi ŝajnas. Poste mi turnis la demandon: Kial ne lerni Esperanton? Kaj mi tuj povis trovi diversajn respondojn. Tiu ne lernas, kiun Eon ne bezonas uzi. Ekzemple rasisto preferas nur propran lingvon. Kaj kiu homo same ŝatas ĉiujn homojn: nigrajn, flavajn, judojn, alireligiulojn, ... Kiu en fundo de sia koro ne portas almenaŭ malgrandetan malamon? Eo estas ne nur la lingvo, sed ĝi estas ankaŭ vivkovinko, kiun la egoisto ne povas kompreni. Kaj kiu homo estas tute sen egoismo? Maldiligenteco estas ĉiam forta argumento por eklerni Eon. La maldiligentulo pensas pri lernado, kiel pri senbezono. Kiu el ni estas konstante diligenta? Kiu hodiaŭ havas sufiĉe da tempo, da pacienco, mono, entuziasmo? Sed la mondo bezonas Eon kiel ilon por interkompreniĝi. Do kiu lernos, disvastigos, varbos, subtenos, uzos, instruos, kulturos Eon? Ĉu anĝeloj? Ne, tute ne, evidente homoj! Mi opinias, ke Eo bezonas reklamon sur ĉiuj anguloj. Ĉiuj devas esti informitaj, por ke ili povu interesiĝi, scii, pri kio temas. La grandan filmon, emocian libron, songon de amata kantisto ... Tamen la reklamo bezonas monon. Ni venis al la fundamento. Ĉu povas esperantistoj fabrikii monon aŭ alian materialan valoron? Kiam ni gajnos rimedojn, tiam ni venkos. Ĉu ne? Jes – tamen la progreson neniu haltigos – kaj Eo estas progreso.

Preskorektoj: En VF 3/93 en la artikolo pro s-ano Janda mi erare skribis la baptonomojn: paĝo 6 linio 11 anstataŭ Antonín Jan kaj lin. 28 anstataŭ Olga Otylie. Mi pardonpetas de la nomitaj gesamidanoj! La redaktoro.

Forpaso: 16 jarojn regule subtenis per malgranda sumeto nian gazeton s-ano Jaroslav Jezbera el Březnice, nám.4. Nun la poŝto resendis nian sendaĵon kun lakona noto: li mortis Oferema, modesta s-ano. Ripozu en paco!

BLANKA KRONIKO: Nun, en tempoperiede de stagnado de nia movado, estas grave atentigi ankaŭ pri meritplena agado de kelkaj s-anoj kaj kluboj. Tia estas s-ano Vlastimil Blažek, membro de la klubo en Olomouc, Jam lia patro estis fendanta membro de la klubo, kie li diligente agas spite sian altan aĝon de 82 jĵ. Kvankam li ne plu kapablas partopreni en la regulaj klubaj kunvenoj, li daŭre pormovade laboras gvidante la kronikon de la klubo, kolektante grandan materialon ankaŭ por la e-a muzeo en Vieno k.s. Li estas modesta homo, kiu neniam atendas repagon por sia aktiveco. Ĝuste pro tio meritas estimon kaj dankon de ĉiuj esperantistoj. B.K.

KLUBO de E-Handikapuloj – estas asocio, kiu plue meritas nian dankon. Ĝi havas 134 aktivajn membrojn, 284 „paperajn membrojn kaj 321 subtenantajn favorantojn. Ili jam fondis internacian klubon, kiu jam estas aprobita de Ministerio por internaj aferoj kiel neregistrara organizaĵo, kiu havas jam membrojn en 15 landoj. La klubo preparas unuan mondkongreson, okazontan en Kladno 9.-16.7.94 (anoncata prezo 1200 Kč por loĝado, manĝado kaj kongreskotizo). Ili eldonas monatan informilon kaj kvaronjaran almanakon kaj nun ili komencis eldoni novan praktikan bildvortaron en kajeroj po 6 Kč. Ĝi estas 8 paĝa konversacia helpilo uzebla en klubaj kunvenoj. Ili gvidas korespondan kurson malmultekoste kaj aranĝis sukcese kelkajn regionajn kunvenojn (Nymburk, Fr. Lázně, Prago). Ili ne plendas pri malfavoro kaj aktivis, kaj akceptas eĉ neinvalidajn favorantojn en siajn vicojn. Detalojn sendos al vi Josef Vaněček, 27401 Slaný, Soukenická 58.

KLUBO de e-istoj de Dro Schulhof en Pardubice vigle laboras (estrino s-anino Jarmila Rýznarová, Na okrouhliku, tel. 21475). Ili aranĝis semajnan konferencon de Freinet-pedagogoj, kiu estis laŭ sia enhavo tre pretendema (52 partoprenintoj eksterlandaj el 9 landoj krom la faka lernitaĵon konatiĝis kun lokaj kaj aliaj memorindaĵoj dum favoraj kondiĉoj – ja ankaŭ eksterlandaj esp-istoj devas ŝpari!). La klubo ne ĉesigis aktivecon ĝi havas eĉ novajn kursanojn kaj meritas nian admiron.

67a esperanta kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda okazos en Strážnice (16.-23.7.94) kaj la Antaŭkongreso en Prago(9.-16.7.94) kun kuna transporto al Strážnice per aŭtobusoj. Riĉa programo kun eblo de renkontiĝo kaj interkonatiĝo kun eksterlandaj esperantistoj estas zorgeme preparata de Vlad. Hasala, pk 36, 69662 Strážnice, kiu sendos al vi informojn. Modestaj prezoj!

Se vi ne povas subteni aktivecon de niaj kluboj per grandaj monsumoj ankaŭ pro nerilataj poŝtelspezoj, subtenu ilin almenaŭ per sendo de poŝtmarkoj!

La 12-a Katolika E-Tendaro okazis 24.7.-8.8.93 en Sebranice apud Litomyšl. Partoprenis en ĝi 80 personoj, el kiuj estis 24 eksterlandanoj. La labortagoj inkluzive sabatoj havis sian firman programon laŭ tendara tagordo. Vivo en la tendaro estis riĉa kaj agadplena. Detaloj vi povas legi en revuo DIO Benu kun programoj de la renkontiĝoj en Ĉ. Třebová kaj Písek.

ASISTI (Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj) invitas al INTERRELIGIA SEMINARIO ESPERANTISTA – Pasko 1994 (31.3.-4.4.) en la urbo Tábor kun la temo: Neniu estonto sen interreligia paco – akcepti diferencojn – venki barojn -serĉi komunon. Informoj Bernhard Weserhoff, p.k. 500133, D-60391 Frankfurt am M.

Dusemajne aperas la plej ofta E-gazeto

E - Eventoj

LINGVO-STUDIO, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario, Telefono & Telefakso: (+36-1-) 1288258
Petu provnumeron!

Ĉeĥa disaŭdiĝo (rozhlas) prezentis la 6.I.93 diskuton pri artaj lingvoj, kiu okazis inter lingvistoj el la universitato de Karlo Dro Jaroslav Peregryn, kandidato de sciencoj, konata specialisto Dro Sáva Heřman el filozofia fakultato kaj niaflanke s-ano Jaroslav Mařík + ing. Jaroslav Pospíšil. Ĉiu el ni devus scii la faktojn, menciitajn en ĝi. Ni povas sendi al vi la tekston de tiu diskuto (kontraŭ 2 trikronaj poŝtmarkoj). Kvankam mi tion jam anoncis en la lasta numero de VF, neniu petis sendon. Eble la anonco eskapis de via atento. Petu ĝin!

6a Internacia kultura festivalo en Ústí n.L. okazis en la tagoj 1.-5.X.93 omaĝe (na počest) al la naskiĝdatrevenoj de E-verkistoj J. Kořínek kaj D-ro Tomáš Pumpr. Partoprenis en ĝi preskaŭ 90 ges-anoj. Pli ol triono el ili el Germanio, Aŭstrio, Francio kaj Slovakio. Okaze de la sabata prelega matineo paroladis i.a. Joachám Giessner el Germanio pri uzo de Eo en internacia fervoja trafiko, Michael Baer (D) pri propono de mondkoncepto „Nova realismo“, Jaroslav Mráz pri Kosmaj kantoj de Jan Neruda kaj hodiaŭa astronomio, Jaroslav Mařík pri F.J.Lorenc kaj Inĝ Magda Fejfičová (SK) pri TUTA-renkontiĝo 1993 en Žilina. Posttagmeze efektiviĝis ekskurso al aŭstria, prusia, franca kaj rusia monumentoj, konstruitaj 10 km de Ústí nL (apud Chlumeck kaj Přestanov) rememore al viktimoj de unu el napoleonaj bataloj en la jaro 1813. Ĉefprogramo de la festivalo fariĝis sabata koncerto, dediĉita al 87-aj neĝisvivitaj datrevenoj de la naskiĝo de ambaŭ E-literaturistoj. Pri iliaj vivoj kaj verkado paroladis, kiel jam tradicie L. Mařík kaj prof. Novobilský, Eva Seemanová nia fama konata E-aktorino prezentis du Apokrifojn de K. Čapek, e-igitaj de J. Vondroušek kaj 2 poemojn, 9-jara Zuzanka Urbanová violinis, Bohunka Šrutová klarnetis, Ema Hubáčková kaj Miroslav Smyčka kantis operajn kaj operetajn ariojn kaj duetojn, dume Grete Scharf el Aŭstrio folklorajn kantojn de sia hejmlando. Krome kontribuis akordeonisto Kamil Kříž kunkantante, piankompanis Jan Zimmer. Dimanĉe oni ekskursis aŭtobuse en la urbeton Libochovice, naskiĝlokon de la fama ĉeĥa natursciencisto Jan Evangelista Purkyně (kies nomon cetere portas la universitato en Ústí nL) por tie viziti la belan kastelon.

Uzu prave la prepoziciojn! (Daŭrigo)

ĈIRKAŬ – prepozicio uzata en diversaj sencoj. En la spaco ronde kuŝanta ĉiuflanke de io: havi rubandon ĈIRKAŬ la kolo. La tero rondiras ĉ. la suno. Danci kiel kato ĉ. la potu. - En senco de la tempa rilato: Ĉ. la tagmezo. Ĉ. la sesa. - Ĉ. estas ankaŭ pseudoadverba prepozicio, trafanta nur la sekvantan numeralon kaj ne influanta la kazon de la akompananta substantivo: Mi bezonas nur ĉ. dek kronojn. Ili mortigis ĉ. mil virojn. - Adjektive uzata: ĉirkaŭa mondo. - Adverbie: danci ĉirkaŭ en la salono; aperis ĉirkaŭe polvaj nuboj; la akvo verŝiĝis ĉirkaŭen de la altaro; rigardi ĉirkaŭen. - En la sendo de „proksimume“: ĉirkaŭe kelkaj miloj da soldatoj. - En la verba senco - ĉirkaŭi: policistoj ĉirkaŭis la rabiston; bruo ĉirkaŭis lin; kastelo ĉirkaŭita de fosoj; lia nomo estos eterne ĉirkaŭita de gloro. En la senco de la substantivo: ĉirkaŭo = periferio, perimetro, zono. Ĉirkaŭaĵo – spaco, regiono ĉirkaŭ io; bela ĉirkaŭaĵo de Parizo. - Ĉirkaŭigi = fari ke io estu ĉirkaŭigita: vi ĉirkaŭigu vian kolon per perloj. - Ĉirkaŭ povas esti uzata ankaŭ kiel prefikso el la senco de la prepozicio: ĉirkaŭiri; ĉirkaŭkolo (náhrdelník); ĉirkaŭmano; ĉirkaŭpremi, ĉirkaŭmordi (okousati) ostoj; ĉirkaŭtranĉi; ĉirkaŭskribi.

DA - estas prepozicio esprimanta gramatike ĉiam nedefinitan kvanton, nombron, mezuron, pezon; glaso da akvo, dekduo da pomoj (post substantivigita numeralo); unu kilogramo da teo; dek du jaroj da laboro; peco da ŝtofo; plenmanoj da cindroj; torento da larmoj; ombro da dubo. DA estas uzata inter du substantivoj, kiam oni volas montri aŭ esprimi, ke la unua mezuras la duan; alivorte: oni uzas DA, kiam la antaŭa vorto respondas al la demando: kiom multe? Bukedo da rozoj – montras la kvantom da floroj. Bukedo de floroj – atentigas pri la speco de la floroj.

- ONI NE UZU DA:

1. Antaŭ la artikolo LA: kvaronjaro estas peco de la jaro.
2. Antaŭ la vortoj ĉiuj kaj tuta: nur kelkaj el ĉiuj voĉdonantoj.
3. Antaŭ la montraĵoj, posedaj kaj nombraj pronomoj kaj adjektivoj: iom de tiu ĉi kuko – kontraŭe – iom da kuko.
4. Antaŭ la substantivo montranta per si mem precizan kvanton: parto de la jaro; duno de monato. Neniaj uzu DA antaŭ la frakcioj: kvarono de la jaro. Antaŭ la personaloj Zamenhof uzas DA: la maljunulino kolektis berojn kaj donis al ŝi iom da ili. Oni nun emas uzi El en tiaj kazoj.

Ostrava-Poruba: Sukcese finiĝis kurso kun ok gekursanoj. Ĉiu jam havas sian plumamikon en eksterlando. Ĉiu jam ĉeestis ian internacian renkontiĝon de esperantistoj: internacian renkontiĝon sur la monto Ĉantoria, internacian renkontiĝon de E-handikapuloj en Frant. Lázne kaj la plej juna – dekkvarjara Hranický ĉeestis la SAT kongreson en Bulgario kaj salutis ĝin en nomo de la klubo. Du kursaninoj s-aninoj Prášilová kaj Tesařová iam eĉ kontribuis al internacia gazeto. La kurson gvidis s-ano Sládeček.

SKOLTO 93 Žimrovice (3.-13.VIII.93): Belega tendaro de E-skoltoj apud rivero Moravice, taŭga programo por junularo, bivakfajroj, ekzkursoj. Ĉeestis geskoltoj el Belgio, Pollando, Rusio, al kiuj helpis iliaj familioj kaj parencoj mone, ĉar vojaĝkostoj por ili estas multekostaj. Ili veturis el Ivanovo tri tagojn por aŭdi internacian lingvon.

Skolta Esperanto-Ligo 75 jaroj: Ĝi estis iniciatita en la j.1918 de Alexander William Thomson, flegisto kaj brankardisto. La plej granda sukceso de la ligo estis eldono de Tenduma terminaro kaj lernolibro Ĵamborea Lingvo, kiu estiĝis ekzemplo ankaŭ por aliaj junularaj tendaraj lernolibroj. Eĉ nia Lančov havas sian originon en la skoltaj tendaroj! Helpu disvastigi Esperanton inter skoltoj, per instruado en lokaj skoltaj grupoj! Per informoj servos al vi nia landa reprezentanto de Skolta Esperanto Ligo s-ano Pavel Sittauer, Hartmannova 1128, Třebíč 64701.

Ostrava-Poruba: Úspěšně skončil kurs 8 frekventantů. Každý už má svého korespondentního přítele. Každý byl už na nějakém mezinárodním setkání esperantistů: mezinárodní setkání na hoře Čantorii, mezinárodního setkání postižených esperantistů ve Frant. Lázních a nejmladší – čtrnáctiletý Hranický byl na kongresu SAT v Bulharsku a pozdravil ho jménem klubu. Dvě kursantky s-anino Prášilová a Tesařová dokonce poslaly příspěvky do mezinárodního časopisu. Kurs vedl s-ano Vlado Sládeček.

SKAUT 93 Žimrovice 3.-13.VIII.93: Překrásný tábor E-skautů při říčce Moravice, vhodný program pro mládež, táboráky, výlety. Byli přítomni skauti z Belgie, Polska, Ruska, kterým pomohli jejich rodiny a příbuzní finančně, protože pro ně byly cestovní náklady vysoké. Cestovali z Ivanova 3 dny, aby slyšeli mezinárodní jazyk.

Esperantský skautský svaz 75-letý: Vznikl z iniciativy Alexandra Williama Thompsona, ošetřovatele a nosiče raněných v r.1918. Největším úspěchem svazu bylo vydání Tábornického termináře a učebnice Ĵamborejský jazyk, který se stal příkladem jiným mládežnickým učebnicím. I náš Lančov měl svůj původ ve skautských táborech! Pomozte rozšiřovat Esperanto mezi skauty, vyučováním v místních skautských skupinách! Informacemi poslouží vám náš zástupce Esperantského skautského svazu Pavel Sittauer, Hartmannova 1128, 64701 Třebíč.

Nekvasovy – 1.-7.VIII.93 renkontiĝo apud Nepomuk, kiun aranĝis la E-klubo en Plzeň sub gvido de s-ano Jiří Vomáčka senprofite; pro tio estis la prezo malmultekosta kaj por ĉiu favora. Oni loĝis en Sokol-tranoktejo en trankvila loko inter arbaroj, al kiu apartenas banejo, ekzercejo, pilkludo. La programo estis zorgeme preparita kun vesperaj bivakfajroj kaj kantado de esperantaj kantoj. Kvankam la raportanto ne menciis nombron da partoprenintoj, la sukceso de la tendaro antaŭdiras tradicion de la klubaj someraj tendaroj aranĝotaj. Informu ĉe la klubo jam printempe!

Laŭ informo de brazila gazeto „Informoj“ dum kunsido la skoltaj gvidantoj en Hindujo oni decidis, ke la lingvo Esperanto estu deviga lernoobjekto en nacia programo de skoltismo.

1111 spiritaĵoj kaj aforismoj: tradukaĵo de la membro de la klubo en Brno, Ing J. Borský korektata de J. Vondroušek. Praktika helpilo por buntigi la instruadon de E-o, amuza legado. Se vi havas seriosan intereson, skribu al la aŭtoro Ing.J.B., 63800 Brno, Nezvalova ul. 7.

Nekvasovy – 1.-7.VIII.93 setkání u Nepomuku, uspořádané E-klubem Plzeň pod vedením s-ano Jiřího Vomáčky bez zisku; proto byla cena levná a pro všechny příznivá. Bydlelo se v noclehárně Sokola v tichém místě v lesích, k níž náleží koupaliště, tělocvična, hřiště. Program byl pečlivě připraven s večerními táboračky a zpěvem esperantských písní. Ačkoliv zpravodaj nevedl počet účastníků, úspěch tábora předpovídá tradici klubových letních táborů do budoucna. Už na jaře se v klubu informujte!

Podle informace brazilského časopisu „Informoj“ na zasedání vedoucích bylo rozhodnuto, aby jazyk Esperanto byl povinným předmětem v národním programu skautů.

1111 vtipů a aforismů: překlad člena brněnského klubu ing.J.Borského korigovaný J.Vondrouškem. Praktická pomůcka k zpestření vyučování E-a, zábavné čtení. Máte-li vážný zájem, napište si autorovi: Ing J.B., 638 Brno, Nezvalova u.č.7.

Kiel diri?

PRAKTIKA ESPERANTA FRAZEOLOGIO de LENTAIGNE. Daŭrigo de la konversacia temo KONGRESO:

Eviti (vyhnout se) akran polemikon, ĉion polemikan, agresivan. Pli akriĝi la disputon Akre batali ies (něčí) proponon. Ne povi aŭdi sian voĉon. Rebati atakon. Sterila diskuto. Retiriĝi kun honoro. Fluoj de diversaj opinioj. Riĉa provizo da ideoj. Neakordigebla konflikto. Estas abismo inter tiuj du opinioj. Lasi la pordon malfermita por nova traktaĵo. Debati. Polemiki. Kontesti (popírat). Repliki. Objeti (namítat). Refuti (vyvrátit námitky). Opona opinio. Defendi sian vidpunkton. Kostu kiom ĝi koston, mi defendos mian projekton. Neniu havas la rajton dikti al mi siajn postulojn (požadavky). Ŝanĝi sian opinion sub influo de antaŭkongresa agitado. Barakti (zmítat se) en kontraŭdiroj. Forbalai (odmést) ĉiujn objetojn. Ĵongli per argumentoj. Persista (vytrvalý) kontraŭulo. Ĉerpi el sia arsenalo da argumentoj. Montri sin tute necedema (neústupný), firma. Obstina (tvrdošíjná) opozicio. Stari ĉe la sama punkto. Teoria diskutado kondukos al nenio. Por ke la diskutado estu trankvila, matura kaj fruktodona ... Mi revenu al la demando. Diskuti la „por“ kaj la „kontraŭ“. Unuj jesas, aliaj neas, ceteraj silentas. Deklari sin kontraŭ la propono. Ankoraŭ ne estas dirita la lasta vorto. Finveni al kompromiso, al interkonsento. Ne serĉi vanajn kompromisojn, kiuj flikas lokon, kreviganta alian. Elĉerpi ĉiujn eblojn de solvo. Silenta interkonsento.

Mařík Jaroslav, honora membro de UEA kaj ĈEA atingis la 22an de decembro sian vivjubileon-80jariĝon. Kvankam fine de novembro terpuřita de neserioza ŝoforo sur la placo de Venceslao en Prago li suferis cerboskuon, li jam resaniĝis kaj ni esperas, ke li restos ĉiam plene vigla, tiel, kiel ni ĉiuj konas lin. Dum sia vivo li kolektis grandan valoran lingvan materialon, el kiu ni ĉerpas en nia esp.agado. Lia akceptu gratulon de la vasta verda komunumo kaj ni ĉiuj ankoraŭ longe ĝuu lian fekundan ĉeeston inter ni. (Adreso de la jubilisto: 12000 Praha 2, Žitná 32)

KORESPONDI DEZIRAS Mallongiloj (Zkratky):bk=bildkartoj; ĉt=pri ĉiu temo; d=deziras; iŝ=interŝanĝi; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; pm=poŝtmarkoj; s-ano=samideano; s-ro=sinjoro; tm=tutmonde.

Kasper Frank, Tassilostr. 15, D-90429 Nürnberg iŝ pm tm.

Ĉiam konstante akceptas korespondo-dezirojn kun japanoj Japanana Korespondo-Servo KLEG, Sone-higasi 1-22-46-204 Toyonaka-si, 561 Japanio.

La jogo de nutrado – al tiuj, kiuj ne povas aĉeti ĉi tiun libron, mi proponas pruntedonon. N. Fontannas, Ruizelet 9, CH-1009 Pully, Svislando.

Kuraĝigu 15-19 jarajn komencantojn de Esperanto-grupo: Polanska 6, Slivnica, SI-62312 Orehova vas, Slovenio.

D-ro Maurizio Consorte, via del Peligni 110/a, I-66100 Chieti, Italio, kuracisto, dentisto d kunlabori kun universitataj kolegoj, interesiĝantaj pri buŝa ĥirurgio.

Almanako Lorenz – ekzempleron de tiujara eldonaĵo sendos al vi donace Spirita Eldona Societo F.V.Lorenz, Caixa Postal *133, "0001-970 Rio de Janeiro, Braz.

S-anino Monique Dressy, av.Guerpillon, F-69290 Pollionay, 57j eksfarmaciistino d kor. konanta Pragon, pri naturo, libroj, filmoj, vortludoj, socia vivo.

Krákora Milan, CZ 33202 Starý Plzenec 543, 34j, handikapulo, kol fotografaĵojn kun subskriboj de geaktoroj, gekantistoj kaj grupoj el F, H, GB, D, Japanio, Aŭstralio, Kanado, Usono.

Michael j.Gunton, 62A Albert Road, Southsea, Hants P05 2SL, Britio, membro de Ymca volas kor kun aliaj Ymca-membroj pri movadaj aferoj.

*

Eperantský klub
CZ Mnichovo Hradiště

Podávání novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt
Střední Čechy v Praze, č.j.P/Piš-2295/92 ze dne 16.XI.1992